

El malnovaj vortaroj - difinoj kaj meditaĵoj

Por ne nur trakti seriozajn fakajn aferojn, nia amiko Heinz-Dieter Hartig proponis „en-TeKu-igi“ du trovitaĵojn el vortaroj de *BROCKHAUS*, kun siaj humuraj pripensoj.

1. Sub „**kontenteco**“ li trovis en Brockhaus Conversations – Lexikon de 1850:

Difino

Kontenteco estas kutime konstanta animstato, per kiu la homo akceptas sian sorton kaj rilatojn kompare kun siaj deziroj. Gaja temperamento kaj la kutimo, serĉi la bonajn flankojn, subtenas la kontentecan. Sed la ĉefa trajto estas, redukti siajn dezirojn, direkti siajn klopodojn al nepereemaj aĵoj kaj nepre fidi al Providenco.

Meditado

Enketoj eltrovis, ke la nombro da feliĉaj kaj kontentaj homoj restis en la lastaj 50 jaroj konstante inter 25 ĝis 30%. Tiu fiksa kerno da feliĉuloj kaj kontentuloj estas per nenia merkata artifiko pligrandebla.

La samaj enketoj atestas, ke la nombro da duone feliĉaj kaj kontentaj uloj konstante kreskas. Ĉu tio signifas, ke la nombro da malfeliĉuloj konstante malkreskas?

Tiru mem la konkludon, kara leganto.

2. Sub „**ruladoj**“ li trovis en Brockhaus Real.Encyklopedie de 1874:

Difino

Ruladojn oni nomas rapidajn sinsekvojn de sonoj, per kiuj estas melodioj ornamitaj. Ili postulas muzikaĵojn kun vigla movo, en kiu tamen troigo estas evitenda. Flanke de artisto ili postulas persistemon.

Meditado

La sekvo de troigo ĉe rulado (tiukaze laŭ PIV: „**rulaĵo**“ en kuirarto) montriĝas plej malfrue post la rostado, kiam la rostfadeno ne povis teni, kion la kuiristo enpremis. Kiu estas post opero-aŭskultado tute elĉerpita, povas tion atributi al superŝarĝo de siaj timpanaj membranoj.

Dieter Hartig



Terminara Kuriero

TeKu 121

Marto 2004

Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF

Gvidanto de Faka Komisiono:

Jan Uldal Niemann, Hovedvagtsstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingor

Telefono: +45 49 26 13 19 Retadreso: esperanto@mail.dk

Sekretario de Terminara Sekcio:

D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul

Telefono: +49 351 8385877 Retadreso: IFEF.B90GR-mei@t-online.de

Karaj geamikoj,

certe vi konstatis longan paŭzon inter TeKu 120 (julio 2003) kaj ĉi tiu numero. Tamen dum tiu tempo okazis rimarkinda laboro de multaj gekolegoj laŭ la taskoj priskribitaj sur paĝo 6 de TeKu 120.

Komence nia itala kolego Vito Tornillo multe helpis serĉi nacilingvajn difinojn en la datumbanko RailLexic. Ĝis nun ni scias la difinitajn nociojn kun komencliteroj a - f, r kaj ŝ - z de siaj Esperanto-terminoj.

Por traduki difinojn, mi petis esperantistojn kun franca aŭ germana gepatra lingvo, ankaŭ se ili ne estas terminaraj sekcianoj. El Francio tradukhelpis - laŭalfabete - Guy Dauphin, Bruno Henry, helpanto de Sylviane Lafargue (kies nomon mi bedaŭrinde ne scias), Marc Noulin, Jean Ripoché, Pierre Robiollé, Gilbert Stambach kaj Jean-Paul Villermé (kiu pretas daŭre kunlabori). El Germanio helpis Bodo Ehrlich, Heinz-Dieter Hartig, Siegfried Krüger, Elfriede Kruse kaj Walter Ullmann. Ĝis la redaktotino alvenis entute 305 difintradukoj. La helpantoj meritas nian sinceran dankon. Tamen tiu kvanto estas nur ono (takse sesono) de la tuta amplekso. Do restas sufiĉe da laboro por sekvaj jaroj.

Heinz Hoffmann



Kio okazu koncerne la difinojn?

1. Ĉiu kiu disponas komputilon, kaj deziras ricevi la difinojn, bonvolu informi la sekretarion, por ke li sendu - aŭ rete aŭ sur disketo per normala poŝto - listojn laŭ la aktuala laborrezulto. La listoj enhavas RailLexic -ŝlosilnumerojn, Esperanto-terminojn kaj Esperanto-difinojn.

2. La sekretario konstatis, ke multaj nacilingvaj difinoj ne respondas al la terminologiaj reguloj de difinado (ekzemple laŭ Terminologia gvidilo de Heidi SUONUUTI). Tiukaze la sekretario modifis la vortigon, sen ŝanĝi naciajn karakterizaĵojn. Tiel estiĝis pli klaraj tekstoj. Por la necesaj tradukoj en naciajn lingvojn kies difinkampoj ankoraŭ estas vakaj, rekomendindas uzi Esperanton kiel fontlingvon, anstataŭ anglan, francan aŭ germanan. Sekve, se esperantisto-fervoĵisto - eventuale pensiulo - deziras tradukante helpi sialandan fervojan entreprenon, por plenigi truojn en RailLexic, la sekretario povas peri kontaktadresojn.

3. La plej multajn terminojn - kaj nacilingvaj kaj Esperanto-lingvaj - en RailLexic, oni enigis sen scio de nur poste aldonitaj difinoj. Sekve multkaze terminoj ne sufiĉe respondas al la difinoj. Terminologia principo estas, ke difino validas kiel bazo por krei terminon. Do kaze de diferenco, oni korektu la terminon, ne inverse la difinon!

En la sekvanta registro estas listigitaj 24 nocioj por pridiskuti necese novajn Esperanto-terminojn dum kunsidoj en la 56-a IFEF-kongreso. Partoprenantoj bonvolu kunporti ĉi tiun TeKu-on al Sopron. Sekcianoj kiuj ne ĉeestos, estas petataj antaŭ la kongreso esprimi sian opinion pri la unuaj terminproponoj (konsenton aŭ kontraŭproponon) al la sekretario.

Nocioj kun novaj terminoj pridiskutendaj en Sopron

La registro enhavas por ĉiu nocio RailLexic -ŝlosilnumeron, Esperanto-difinon, anglan, francan kaj germanan terminojn - ĝustajn aŭ malĝustajn -, la ĝisnunan Esperanto-terminon - nur malĝustan -, la problemon de malĝusteco kaj la unuan novan terminproponon de la sekretario.

00024 Lokfiksita maŝina instalaĵo por ekmovi vagonojn. *ACCELERATORE*
DEI CARRI
 an wagon accelerator
 fr accélérateur de wagons
 ge Beschleunigungsantrieb; Wagenbeschleuniger
 Es akcelilo por vagonoj

Problemo: Kvankam ĉiuj terminoj mencias akcelon, laŭ la decida difino temas pri ekmovado. La difino estas tre ĝenerala, ekzemple enkludas haŭlmekanismon (04001, 05522).

Unua ŝanĝpropono: **vagonpropulsilo lokfiksita** (*VAGONPROPULSIONE*)

00239 Fervojisto kiu manipulas trakforkojn kaj signalilojn konforme al preskriboj de fervoja ekspluatado. *AGENTE ADDETTO ALLA SEGNALAZIONE*
SEGNALAZIONE

an pointsman; switchman; signalman; panel operator
 fr aiguilleur
 ge Betriebsaufseher (im Stellwerks- und Weichendienst);
 Stellwerkswärter; Weichenwärter
 Es trakforkisto

Problemo: Manipuli trakforkojn ne estas unusola tasko de la fervojisto.

Unua ŝanĝpropono: **trakreĝejo** *SIGNALILISTO*

00431 Ebleco ke la varvagono laŭ specialaj teknikaj normoj rajtas veturi inter diversaj fervojaj entreprenoj. *TRANSITABILIS*

an suitable for transit
 fr apte à transiter; transitable
 ge übergangsfähig
 Es transitotaŭga

Problemo: Temas ankaŭ pri veturoj inter najbaraj fervojretoj.

Unua ŝanĝpropono: **translimiĝtaŭga**

11190 Volvita tranĉbendaĵo el magnetaj materialoj por fabriki magnetojn.

an magnetic belt *NASTILO YAGNETICO/CINGHIA*
YAGNETICA
 fr tôle en rouleau
 ge magnetisches Band
 Es magnetbendo

Problemo: La termino magnetbendo apartenas ankaŭ al la nocio 12473, kaj pli bone taŭgas por ĝi kun la difino: Bendmaterialo el plasto, kun surtavolita molmagnetaj materialoj, por son-, video- aŭ datumregistrado.

Unua ŝanĝpropono: **magnetprodukta bendaĵo**

12324 Kontenero por kombinita trafiko, ekipita per ruloj, translokebla inter kamiono kun hokmekanismo kaj platvagono kun turtmekanismo, en pozicio transversa de la vagono. *IT-MANCA*

an roll-off-container
 fr caisse amovible (pour le transbordement horizontal)
 ge Abrollcontainer (horizontales Umschlagssystem des kombinierten Verkehrs)
 Es (ankoraŭ mankas)

Problemo: La difino supozigas, ke temas pri la mezgranda tielnomata "pa-kontenero" (conteneur à porteur aménagé), jam listigita sub la nedifinita nocio 02023 kun la termino kontenero kun manipuli-ekipaĵo.

Unua terminpropono: **rulkontenero mezgranda**

12416 Infrastrukturaj aranĝoj (trafikkonstruaĵoj, telematiko) kiuj helpas eviti distancajn malfacilaĵojn, kun kostoredukto por la publiko. *IT-MANCA*

an (mankas)
 fr contrainte de l'espace; contrainte spatiale
 ge Raumüberwindung
 Es translokado

Problemo: La termino ne trafas la nocioenhavon.

Unua ŝanĝpropono: **lukto kontraŭ malproksimeco**

12429 Interligo ĉe kiu la interligendaj partoj per forto (ekzemple adherforto) restas en sia reciproka pozicio. *COLLEGAMENTO D'ATTILITO*

an frictional connection
 fr connexion commandée par l'influence de l'adhérence; connexion entraînée par adhérence
 ge kraftschlüssige Verbindung; Kraftschluss
 Es ligo adhera

Problemo: Adhero estas nur unu el pluraj ĉi eblaj fortoj.

Unua ŝanĝpropono: **fizikforta interligo**

08135 Akustika signalo fare de trakciilestro, ĝenerale por antaŭinformi pri la alproksimiĝo de sia veturo.

an whistle *FISCHIO*
fr sifflet; coup de sifflet
ge Pfeife; Achtungssignal; Pfeifsignal
Es fajfilo

Problemo: Temas ne pri signalilo, sed pri signalo, ne ĝenerale fare de iu ajn fervojisto, sed fare de trakciilestro, kaj ne sole pri altfrekvenca sono.

La termino fajfsignalo averta apartenas al la nedifinita nocio 08155.

Unua ŝanĝpropono: **avertsono pertrakciila**

08442 Funda areo de varvagono, disponebla por kargo.

an load area; loading area *SURFACIO DI CARICO*
fr surface de chargement
ge Ladefläche
Es areo porkarga

Problemo: La termino ne mencias, ke temas pri envagona areo.

Unua ŝanĝpropono: **vagonfunda porkarga areo**

08973 Vartrafiko de unu ekspedanto al pluraj adresatoj.

an distribution traffic *TRAFFICO DIFFUSO*
fr trafic diffus
ge Streuverkehr
Es trafiko malcentralizita

Problemo: La adjektivo malcentralizita ne trafas la econ.

Unua ŝanĝpropono: **trafiko distribua**

10254 Stacio deklarita kiel ĉefa, pro sia grava signifo koncerne nombron de ĉiutage alvenantaj kaj forveturantaj trajnoj kun unuopaj varvagonoj.

an main freight station; main goods yard
fr gare principale fret *SCALO MERCA PRINCIPALE*
ge Hauptgüterbahnhof
Es varstacio ĉefa

Problemo: La difino prisilentas, ĉu temas pri varstacio (por kargi/malkargi vagonojn) aŭ pri ranĝostacio (por apartigi/kunigi vagonojn).

Necesas klarigo de francaj kolegoj pri la karaktero de "Gare Principale Fret" ĉe SNCF.

*SOS AN MANUAL BLOCK
FR BLOCK MANUEL (BT); ANTOUBEMENT MANUEL
GE HAND BLOCK*

00625 Avizo sendata de transportisto al la ekspedinto, kun sciigo ke ne eblis liveri varon, kaj kun peto pri lia instrukcio. *AVVISO DI GIACENZA*

an advice of traffic on hand
fr avis de souffrance
ge Unbestellbarmeldung
Es avizo pri ne(trans)liverebleco

Problemo: Ĉi tiu termino ne montras la diferencon al la termino avizo pri malhelpo ĉe liverado por la nocio 00613 kun la difino: Avizo pri nebla livero de varo al la adresato indikita en transportdokumento. sekve de lia foresto, rifuzo, aŭ pro alia kaŭzo. La nokia diferenco do koncernas peton pri instrukcio.

Unua ŝanĝpropono: **petavizo pro nebla livero**

00873 Tuto de operacioj rilatantaj al emisio kaj disdonado de biletoj.

an ticketing *BIGLIETTERIA*
fr billetterie (étude et conception) *(BIGLIETTERIA)*
ge Fahrkartenwesen
Es biletdonado (koncepto)

Problemo: Temas ne nur pri eldono, sed ankaŭ pri emisio de biletoj. La preskaŭ egala termino biletdono apartenas al la nedifinitaj nocioj 02468 kaj 03176.

Unua ŝanĝpropono: **biletkoncerna sfero**

01397 Stacia trakhava instalaĵo, ne rekte servanta por trajntrafiko aŭ ranĝado, ekzemple kargejo, lokomotivejo, veturilbontenejo, vagonlavejo, riparejo.

an additional technical area *PIAZZALE SUPPLEMENTARE*
fr chantier annexe
ge Zusatzanlage; Nebenanlage
Es aldon-instalaĵo

Problemo: La termino estas tro ĝenerala, ne enhavas koncernan konkreton.

Unua ŝanĝpropono: **stacioparto aldonserva**

02474 Nombro de transportoj eblaj sub determinitaj kondiĉoj kaj sub konsidero de klientaraj postuloj. *DOMANDA DI TRASPORTO*

an transport demand
fr demande de transport
ge Verkehrsnachfrage
Es transportbezono

Problemo: Temas ne nur pri bezono, sed ankaŭ pri ebloj. La termino transportbezono apartenas ankaŭ al la nedifinita nocio 00801.

Unua ŝanĝpropono: **transportbezono realigebla**

9 POSTULO

02814 Sistemo instalita en trako, funkcia per magnetkampo, konektiloj aŭ resonancaj cirkvitoj, avertanta trakcilestron pri proksimiĝo al haltsignalo, ekfunkcia danĝerbremسادon kaze de kondukista ne-reago.

an automatic warning system *DISPOSITIVO DI VIGILANZA*
 fr dispositif de vigilance: vigilance
 ge automatisches Warnsystem
 Es vicleckontrolilo

Problemo: Kvankam la nocio rilatas al nesufiĉa vicleco, veran vicleckontrolilon koncernas la nocio 09597 kun la difino: Sistemo aŭtomate bremsanta trajnon okaze de sveneto de la trakcilestro (ties nereago eĉ post avertsono), ekipita per pedalo aŭ regbutono, kiun la trakcilestro je regulaj intertempoj manipulu por konfirmi sian vicle atentan ĉeston.

Unua ŝanĝpropono: **trajnskurigsistemo entraka**

02822 Signalilo de SNCF, kiu en averta pozicio ordonas al la trakcilestro tuj bremsi la trajnon por singarda, laŭvida veturado ĝis la sekvanta renkontota ĉefsignalilo aŭ trafikforke.

an combined distant and stop signal (SNCF signalling)
 fr disque (signal SNCF) *SEGNALIS*
 ge Vorsignalscheibe (SNCF-Signal)
 Es diskosignalilo

Problemo: Necesas termino montranta signalsignifon. La termino diskosignalilo apartenas ankaŭ al la nedifinita nocio 08165.

Unua ŝanĝpropono: **signalilo pri singarda veturado (SNCF)**

03158 Fervojo kies relvojo kaj aliaj transportebiligantaj ekipaĵoj estas propraj de fervojklienta entrepreno, kaj kiu havas trakokonekton kun publika fervojreto.

an industry track: private siding
 fr installation terminale embranchée: embranchement particulier:
 raccordement privé *RACCORDO PRIVATO*
 ge Privatgleisanschluss
 Es branĉtrako privata

Problemo: Kvankam ekzistas tiaj fervojoj kun nur unu trako, ĝenerale ne temas pri tia limigo. Ankaŭ la adjektivo privata ne bone trafas la econ.

Unua ŝanĝpropono: **fervojo klientpropra**

03840 Damaĝa evento nerezistebla kaj (principe) neantaŭvidebla, sendeviganta responson de tiu, kiu konfrontas ĝin sen persona kulpo.

an circumstances outside one's control *FORZA MAGGIORIS*
 fr force majeure
 ge höhere Gewalt
 Es forto ekstervola; forto supera

Problemo: Sinonimoj en faklingvo ne estas dezirataj. Necesas elekti la pli trafan terminon aŭ pripensi novan.

Unua aldona propono: **natura perforto**

05067 Fervojreto malferma por diversaj veturilspecoj.

an main line: trunk line *LINEA PRINCIPALIS*
 fr ligne de chemin de fer; ligne principale
 ge Hauptbahn
 Es fervojlinio ĉefa

Problemo: La senco de la difino estas duba. La termino fervojlinio ĉefa apartenas ankaŭ al la nedifinitaj nocioj 01580 kaj 05040. Necesas klarigo de francaj kolegoj pri la senco de "un réseau de chemin de fer ouvert aux différents types de véhicules". *FERVOJRETO ĈEFA*

05346 Fizika aŭ jura persono kiu ricevis labormision por plenumi konceptadon kaj kontrolon de la realigado pri laboro konforme al programo de la responsulo.

an design consultant; project engineer
 fr maître d'oeuvre *DIRETTORIS DEI LAVORI*
 ge Bauaufsicht
 Es ĉefo konstrulabora

Problemo: Ne temas sole pri konstrulaboroj.

Unua ŝanĝpropono: **programvidanto komisiita** *PROIEKTKOMISIITO*

06158 Pagenda rajto por uzi veturvojon.

an toll (charging) *PEDAGGIO (TASSAZIONE)*
 fr péage (taxation)
 ge besonderes Entgelt (für Straßenbenutzung, Fährbenutzung ...)
 Es ŝoseimposto

Problemo: Ekzistas ankaŭ aliaj veturvojoj.

Unua ŝanĝpropono: **vojuza rajto pagodeva** *ENDA*

07090 Relo sur kiu estas laminita pli malmola materialo en triviĝareo de la relkapo.

an composite rail *ROTAIA PROHISCUA*
 fr rail mixte
 ge Verbundschiene; Zweistoffschiene
 Es (ankoraŭ mankas) *RELO PROFICTRANSIRA*

Unua terminpropono: **relo tavolumita**

07861 Metado de kargo el unu veturilo en alian inter du sinsekvaj transportkontraktoj.

an load transfer *TIAS BORDO DEL CARICO*
 fr rupture de charge (transbordement)
 ge Zwischenumschlag
 Es transkargado

Problemo: Temas ne ĝenerale pri iu ajn transkargado, sed pri ĝi inter transportkontraktoj. La termino transkargado apartenas ankaŭ al la nedifinita nocio 07857 kaj al la nocio 09220 kun la difino: *Metado de kargo el unu veturilo en alian.*

Unua ŝanĝpropono: **transkargado interkontrakta**